FN PER ANC 47

n° 194 Decembro 1997

# ESPERANTO
# NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 45 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

## PRI LA NEŬTRALECO

Kiam oni publike prezentas Esperanton, oni kutime diras, ke Esperanto estas internacia helpa lingvo. Tiu lingvo estas donaco de Dro Zamenhof al la homaro. Ĝi ne apartenas al tiu aŭ tiu popolo; sed ĝi estas ĉies aparteno. Pro tio, ĝi estas neŭtrala.

Pro tio, ni ofte evitas paroli pri religioj, pri politiko, kaj pri io ajn, kun kio, tiu aŭ tiu-ĉi povus ne konsenti !

Tamen, interne de la movado, estas sufiĉe da fakoj, kiuj ebligas al *"sam-ideanoj"* kuniĝi, diskuti, ktp...

Kaj, kiam oni konas la kialojn kiuj spronis Zamenhof'n krei la internacian lingvon, oni ja komprenas ke, neniam iu Esperantisto povus akcepti malamon aŭ forĵeton de malsamuloj. La diversaj fakoj de la movado ne estas koterioj, sed ili nur celas kunigi samideanojn kiuj,-interne de la movado kaj dank al Esperanto-, deziras renkonti amikojn emajn al tiu aŭ tiu fako (Religia, politika, metia, sporta, ktp...)

Bone komprenis tion Marcel BOSC, kiam li kreis en 1945 l'Union Normande d'Espéranto ( Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj)

Tiu Unuiĝo akceptis ĉiujn normandajn samideanojn, kia ajn estis la aparteno al tiu (aŭ tia) societo, movado, (UFE, SAT-Amikaro, Junuloj, ktp ...) aŭ unuopaj ! Tamen nia Unuiĝo ĉiam incitis siajn membrojn aliĝi al asocio, aboni gazetojn ktp.

Je tiu epoko, tuj post la 2a mondmilito, la nombro de Normandaj Esperantistoj estis granda. Ekzemple, pli ol 200 partoprenis Normandan Kongreson en Fécamp en 1947.
La celoj de U.N.E. ne ŝanĝiĝis: kunigi ĉiujn Normandajn Esperantistojn, sed, ve, malkreskis la nombro de niaj anoj.

Karaj geamikoj, memoru tiujn vortojn, kiujn vi iam kantis: "En laboro paca, ne laciĝos..." Kaj savu la Normandan Unuiĝon de Esperanto !

Maurice HUET
Honor-Prezidanto de U.N.E.

ESPERANTO
LANGUE UNIVERSELLE

## ESPERANTO NORMANDIE
## COTISATIONS-ABONNEMENTS 1997:

Nous avons reçu pour l'année en cours les abonnements-cotisations de: Gesinjoroj: Artus, Bataille, Bessière, Boucher, Canu, Caron, Casassus, Chalm, Colombel, Chapotte, Defrance, Deuff, Dubois, Duflo, Dufossé, Evrard, Gibaux, Giordano, Guéroult, Guerre, Guilmot, Guionie, Haulard, Helbert, Huet, Jean, Jourdaine D., Jourdaine M-L, Jouvin, Lamy, Langanay, Lebrun, Lecouvreur, Lefebvre, Legros, Lehéricey, Lemarchand, Leroy, Levesque, Lévy, Loisel, Longuet, Magerel, Mary, Masseron, Mendès, Michaud, Millet, Moyon, Nardin, Nicolas, Ordonaud, Peltier, Quillaud, Quillet, Rauch, Robiolle, Roblin, Rousseau, Séry J, Séry S, Tailpied, Tanguy, Touileb, Varneville, Zilliox

Si votre nom ne figure pas dans cette liste, c'est que:
- vous avez oublié de régler votre cotisation 1997
- ou bien vous êtes un nouvel espérantiste auquel nous adressons ce bulletin gratuitement pendant un an
- ou bien vous êtes une association, un groupement, une personnalité amie de l'Esperanto et nous vous l'adressons pour information.

Nous avons déjà reçu quelques abonnements pour 1998; nous en publierons la liste ultérieurement.

*****************************************************************

## *BONDEZIROJ*

Ni deziras al niaj gelegantoj ĝoje travivi finjarajn festojn kaj agrable komenci la novan jaron ! 1998 estu por ĉiuj bona kaj feliĉiga.

Ni deziras ankaŭ ke ĝi estu pozitiva por nia Unuiĝo kiu ege bezonas reaktivigon. En septembra bulteno, mi alvokis por renovigo de la estraro; mi esperas ke ĉiuj bone meditis pri tio kaj faros proponojn antaŭ la Ĝenerala Kunveno. Estus domaĝe ke nia Normanda Unuiĝo forfalu dum Esperanto progresas en aliaj regionoj.

Ni deziras ke Universala Kongreso kiu okazos en Montpellier estu sukcesega; ni deziras ankaŭ ke multaj Normandoj ĝin partoprenu ĉar de 40 jaroj ĝi ne okazis en Francio.

*****************************************************************

**NIA BULTENO:** J'ai reçu le mot suivant: *"Je ne désire plus être adhérente de l'U.N.E. parcequ'il n'existe plus de rencontres au sein du groupe local"*

Voilà une occasion de rappeler que justement notre bulletin a pour but de regrouper des espérantistes isolés et de leur donner les moyens d'utiliser et de pratiquer la langue qu'ils ont commencé d'apprendre en participant à des stages, à des congrès, en s'abonnant à des revues, et en lisant des livres



**ALVOKO AL JUNULOJ:**
Estus bone ke gejunuloj (malpli ol 35 jaraj) grupiĝu en junul fako por amike renkontiĝi kaj organizi aktivaĵojn .
Bonvolu kontakti:Yves BACHIMONT 106 rue d'Orléans
14000 CAEN Tél. 02 31 75 15 74

---

**GRAND QUEVILLY-ROUEN**
Dek-unu grupanoj kunvenas ĉiuĵaŭde en Centre Socio-Culturel de Grand Quevilly de la 17a45 ĝis la 19a30 por diskuti, traduki, informiĝi pri esperantistaj aktivaĵoj. La etoso estas tre simpatia.

**LE HAVRE**
Ni tre bedaŭras la forpason de Denise NOËL, dojenino de la grupo. Kvankam 90-jara, ŝi restis ĝis vivfino aktiva esperantistino. Ŝi malavare kotizis kaj mondonacis por U.N.E. kaj SAT.Vi povos legi pri ŝi artikolon de Jean Gibaux

**FECAMP :**
Trian fojon, Esperanto ĉeestis "la 5an Ekspozicion de Radioamatoroj, RadioDiletantoj (cibistes) kaj Komunikado" kiu okazis la 25an kaj 26an de Oktobro 1997 en Fekampo.

Dum tuta semajnfino, tiu salono de per-onda komunikado kunigis radioamatorojn el Havro, Rŭeno, Kalezo, Belgio kaj kompreneble Fekampo. Jen kion notas la gazeto *"Le Courrier Cauchois"* pri nia ĉeesto : *"La Esperanto-Klubo de Fekampo esperas konvinki la radio-amatorojn kaj diletantojn ke tiu lingvo estas la plej taŭga komunika rimedo inter la popoloj."*

Ni ambiciis kovinki neniun sed nur prezenti kaj konatigi nian lingvon. Kaj tion, ni plezure faris. Se la ĵurnalistoj estus konsultintaj nin, ili certe ne skribus tiun pretendeman jesdiron.

Ĝi estis inaŭgurita de Sro Michel, urbestro de Fekampo, kiu, kun liaj adjunktoj, vizitis nian budon. Li diris dum sia inaŭgura parolado: *Radio-amatoroj kaj diletantoj posedas virtojn kiuj, laŭ nia vidmaniero, estas esencaj, ĉar ili komunikas amikece kaj fervore. Ili plenumas esencan taskon en la komunikado inter homoj.*

Nia ĉeesto estis estimata kaj rimarkata ĉar ni budĉeestas ĉiujare (krom la jaro 1995) Sed, Esperanto estis anoncata por la unua fojo en gazeta artikolo (Le Progrès 18a de Oktobro 1997)

La ekspoziciantoj venis plejparte rigardi nian budon kaj diskuti kun ni pri la internacia lingvo aŭ la multlingva temo. Unuvorte, pli scii pri ĝi !

Ni estis 4 deĵorantoj por Esperanto: Taous kaj Mouloud Touileb, Jeannine Lesueur, André Legros kiu venis de Bondy sed kiu estas elkora Normando. Tiuokaze, Jeannine de Fekampo kiu partoprenis agadojn de malnova fekampa grupo retrovis plezure fotajn memoraĵojn pri la estinta grupo. Ŝi montris ilin al la urbestro, mira kaj rava pro sia konstato: Fekampanoj laboris pri tiu lingvo kaj ili daŭrigas tion. Jeannine sukcesis kunigi la "gemalnovulojn" (Gesinjoroj Lamauve, Marical, Clément-Leleu, Jahier).

Ni ankaŭ ricevis amikajn kaj subtenajn vizitojn de Havraj esperantistoj kiuj kuniĝis al ni dum la "familia foto". Gesinjoroj Gibaux kaj Fraŭlinoj Séry tien veturis aŭtobuse. Agrabla diskuta momento pro la pedagogia valoro de Esperanto ĉirkaŭ amikeca glaso !

Tiujara manifestado akceptis malpli da vizitantoj ol pasinta jaro (proksimume 500 en 1996 kaj nur 350 en 1997) Nia budo estis vizitata de 26 personoj sabate kaj 30 dimanĉe. Ni kalkulas tiujn kiuj petis informojn aŭ ricevis dokumentojn.

Aliri la gevizitantojn estas utile sed eniri rekte en la kernon de la temo ne estas la bona maniero. Nia kunparolanto devas larĝe konigi sian opinion pri la temo de la komunikado kaj ĝenerale eĉ pri la multlingva kaj angla-lingva temo. Tamen, kelkfoje, rapidi ni devas pro vizitantamasiĝo. Estas bone aldoni informojn precizajn, taŭgajn kaj komuniki iomete da pasio por la lingvo !

La aĝo de la gevizitantoj estis inter 20 kaj 40 jaroj. Pli da junuloj sed malpli da virinoj ol pasintan jaron. Sendube, tiu hobio pli interesas la virojn. Ĉe nia budo, vizitantoj kunprenis dokumentojn kaj nian adreson; plej multaj nenion sciis pri Esperanto. Ni faciligis la klarigojn per demonstreto helpe de skribilo, tabulo, koloraj etikedoj

Ni bedaŭris la malĉeeston de perinformatika budo "Internet".Pasintan jaron, ĝi ebligis malkovron de la Reta adreso de SAT-Amikaro

Post tiu publika informado, ni ne ankoraŭ ricevis rezultojn sed ni ne mankos informi la gelegantojn de UNE Bulteno pri eventualaj novaj kontaktoj, aparte inter la radio-amatoroj aŭ diletantoj de nia regiono.

Mouloud TOUILEB

*************************************************************

**Un sérieux désavantage !**

A Troyes, au cours de son premier voyage en province, depuis le début de la cohabitation, le Président Chirac a été interviewé par 3 lecteurs de "Mon Quotidien", un journal pour les 10-15 ans. Interrogé par Adeline (13 ans), Clément (13 ans), et Constance (10 ans), voici sa réponse à leur question qui était la suivante: *"Parlez-vous anglais lors de vos séjours à l'étranger?"* Réponse du Président : *"Oui, avec mes amis, mais jamais dans les discussions officielles, car je ne parle pas parfaitement cette langue et ce serait donc un handicap. Pour les sujets sérieux, il faut être sûr d'être bien compris."*

Que peut-on en déduire? Le Président de la République reconnaît lui-même qu'il ne maîtrise pas suffisamment la langue anglaise pour se permettre de l'utiliser dans les discussions officielles. Si tous nos représentants politiques prenaient au sérieux l'Espéranto, ils réaliseraient combien cette langue,-européenne par excellence-, rend capable d'aborder des sujets sérieux et dépasser ce handicap du multilinguisme européen. L'élite de la nation, elle-même, ne parvient pas à le dépasser et pour cause. C'est pourtant ce que l'on propose officiellement aux élèves en leur imposant d'apprendre 3 ou 4 langues en Terminale, qu'ils ne maîtriseront jamais parfaitement. Soyons sérieux !...

Mouloud

Nos amis Touileb ont adressé une lettre au Président Chirac le 11/10/97

**HEROUVILLE SAINT CLAIR**

Komence de 1997, ni sendis al 150 regionaj kaj lokaj respondeculoj ekzempleron de la Manifesto de Prago. Kelkaj afable respondis, sed nur J-P Viaud, regiona konsilanto faris proponon por diskonigi kaj uzi Esperanton.

Li rilatigis nin kun la Priturisma Regiona Komitato de Normandio kiu jam de pluraj monatoj aperigis Interretajn paĝojn en 6 lingvoj (franca, angla, germana, itala, hispana, nederlanda). Ni organizis tradukteamon en nia klubo.

La Esperanto-versio aperis la 1an de oktobro kun 9 ĉefaj temoj (klimato, historio, artoj, industrio, agrikulturo, ktp... Baldaŭ aperos deka paĝo pri "Turismo statistike" Esperanta versio estas akceptita por plurmonata provperiodo: la esperantaj paĝoj restos en Interreto se estos sufiĉe da alvokoj. Tio signifas ke por resti en la Interretaj paĝoj de tiu Priturisma Regiona Komitato, la esperanta versio devos esti konsultata mult kaj multfoje, prefereble de ĉiuj kontinentoj.

Ni kompreneble bezonas vian subtenon por reklami ne nur pri Normandio, vizitinda regiono, sed ankaŭ pri legado de ties http paĝoj

**http:/www.normandy-tourism.org**

*************************************************************

**LE HAVRE** **NIA DOJENINO FORLASIS NIN**

++++++++

Nia naŭdek-jara membro, Denise NOÊL, mortis la 9an de Oktobro. Ĝis-osta esperantistino, ŝi neniam havis la plej etan dubon je la plu-irado de Esperanto ! Kaj tio, depost kiam ŝi ek-konis sian estontan edzon en la jaro 1935. Lia nomo "Noêl" sonas jam kiel ŝato al la homoj, kaj lia antaŭnomo "Espérance" portis en si ĝermon kiu ekvivis okaze de trovaĵo: senpretenda libreto pri Esperanto, ĉe brokantisto !

Nu ! En la tridekaj jaroj, ekzistis 2 grupoj en nia urbo: la "Neŭtrala" kaj la "Laborista". Kiel ofte en niaj por-esperantaj klopodoj, la "aferoj" estis maltre viglaj: la 2 grupoj nombris nur kvinon da anoj entute! "ESPE"(rance) (tiel nomis lin liaj amikoj) legis en gazeto ke en la urbo Liono (Lyon), la filino de Zamenhof, Lidja, gvidis kursojn pri Esperanto, kun granda sukceso. "Espe" renkontigis la malmulton da esperantistoj... kaj igis ilin decidi komunan agadon. Do, korespondado kun Lidja, pretigado de ŝia veno, loĝigo dum 3 monatoj, ĉambroj por prelegoj kaj kursoj, kaj kompreneble ... mono !

Kaj ŝi venis ! ... Vera aktorino, Lidja entuziasmigis la ĉe-estantojn, kiuj mirinde alkroĉiĝis al la lernado.... Post 3 monatoj, en tiu jaro 1936a, oni kalkulis pli ol 100 membrojn !...

Bedaŭrindege, tri jarojn poste, tiu nobla aktiveco : 3 grupoj, kaj unu klubo, estis subite forviŝata pro nehaltigebla sovaĝeca ŝtormo.

La milito malkunigis la gefianĉojn. Denise povis nur konstati la neniiĝon de la Por-esperanta agado. "Espe", militkaptito en Germanio, portis sur sia militĉapo la verdan stelon. Okaze de laboro ĉe germana kapitano, tiu-ĉi konigis sian esperantistecon: li eĉ konfidis ke, dum la jaroj 36/38, li korespondadis kun nederlandanino cele al geedziĝo...

Denise kaj Espe geedziĝis perletere, tra diversaj administracioj en la jaro 1943a. Espe revenis en 1945. Kiel dekmiloj da homoj, trovado de loĝejo kaj laboro estis la urĝa klopodo. Por ili ambaŭ, aldoniĝis la dediĉo al ilia celo kaj idealo: ambaŭ helpis al la revekiĝo de Esperanto. Vizitanto de ties hejmo antaŭĝuis la plezuron babili en la lingvo.

Espe mortis la 15an de Januaro 1981. Denise kiomeble helpis al la grupoj, al la asocioj, malavare. Ŝi havis noblan animon kaj modestan sintenon favore al sia kunparolanto. Ŝia forpaso estas malĝojiga spertaĵo: ni sciu estontece adopti kun espero kaj pli da sagaceco la ekzemplon de niaj pioniraj antaŭuloj !

ESPERANTO-Le Havre



@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

## KURSOJ EN LA ESPERANTO-DOMO

Kion fari dum feriaj tagoj ? Ĉu ne estas bona momento por pli esperantiĝi ? Ni opinias ke jes, do...same kiel pasintan jaron, ni staĝis dum 2 semajnoj en Grezijono

Estis sama loko, sama vetero...sed ne samaj kursoj !
Ni estis proksimume 8 aŭ 9, el diversaj landoj: Aŭstrio, Hispanio, Irlando, Francio, kiuj laboris ĉiutage.

Tiun-ĉi jaron, gvidataj de Marcelo Ternant, ni batalis por superi gramatikon ! Por ni estis festivalo: NI paŝis de "ig" al "iĝ", ek, ies, ties, ĉies . Alveninte ĉi-tie, ni iris ĝis adjektivoj kaj adverboj; post tiu paŝado, ni trovis konjugaciojn kaj eĉ en impeto: la karan akuzativon !

Ĉu vi kredas ke tio estis finita ? Tute ne: la plej granda malfacilaĵo estis venonta...Kiu?... La refleksivo... Jes, vi konas: " lia, ŝia, ĝia kaj...sia"! Estas ankaŭ la ludo de kunmetitaj vortoj kun: sin, mem ktp...Ĉu estis la fino ? Ne !

Ankoraŭ estis altradukoj kaj detradukoj de tekstoj pli aŭ malpli penigaj, skribitaj de diversaj verkistoj, el kiuj estis ekzemple Sainte-Beuve. Tia estis la programo !

Finfine, ni ne perfekte triumfis...sed ankaŭ ni ne fiaskis lamente; ni rendevuis duoble: kun ni mem por plu studadi, kaj kun gramatiko por turmenti ĝin, eĉ en la plej malgrandaj frazoj.

Marcelo estas sperta; ĉiuj scias tion, do finfine estis tre agrablaj momentoj kiujn ni trapasis en la kursoj. Kursoj ne estis ordinaraj. Marcelo ne instruis rekte; li organizis debatetojn pri la koncernataj punktoj, kaj fine, post klarigoj, li demandis ĉu ni jesis lian vidpunkton. "konsentite ?" li diris.

Ni havis ankaŭ alian okupaĵon; kune, Phil kaj mi, registris sur

magneta bendo 40 poemojn skribitajn aŭ tradukitajn de Marcelo kaj diritajn de li mem.

Fine de ĉiuj posttagmezoj, okazis prelegetoj faritaj de Pĉerneĉ, iu tre lerta Polo, pri diversaj temoj. Kelkajn ni ĉeestis. Estis plezure aŭskulti lin, ĉar li parolis tre flue, tre distingeble kaj tre facile per komprenebla maniero.

Ne kredu ke ni nur laboris, ĉar laborinte ni ludis skeĉon en kiu Phil estis asesoro de la juĝisto Marcelo kaj mi kulpulino pri misuzo de akuzativo. Oni juĝis min. Ni prezentis tiun "spektaklon" vespere. Okazis ankaŭ koncertetoj muzikitaj de Ingrid Plazota (Aŭstrianino) per citro kaj unufoje akompanita de junulino per violono.

Iuvespere okazis ke Marie-Thérèse Lloancy parolis pri Henri Micard kiu estis la "patro" de la Esperanto-domo (vidu Kulturajn Kajerojn), ĉar estis la centjarfesto de lia naskiĝtago.

Estis ankaŭ okazo revidi gekonatulojn kaj interparoli plezure kun ili. Por tio la manĝomomentoj estas privilegiataj kaj interesaj. Ĉe tablo, oni povas paroli pri ĉiuj temoj kaj ĉiuj ĉeestantoj povas partopreni la konversacion. Okazis ke oni tiel implikas sin, ke oni ne plu manĝas; povas esti ke kaŭze de parolado la tabliĝintoj malfruas kaj restas la lastaj en la manĝoĉambro !

Nun, rekomenciĝas kursnovjaro, ni esperu ke nia staĝo utilu por ni kaj eventuale por aliaj kaj ke nia Esperanto progresu !

Chantal kaj Phil
Grand Quevilly la 1an /10/97

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

## KOTIZOJ 1998 POR ESPERANTISTAJ ASOCIOJ

++++++++++++++++++++++

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO

| | |
|---|---|
| nur kun jarlibro | 120 FRF |
| Jarlibro+revuo "Esperanto" | 310 FRF |

Pagu al Esperanto-France (UFE)4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris

*******************************************************************

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

| | |
|---|---|
| Kotizo+Sennaciulo+Sennacieca revuo+Adresaro | 305 FRF |
| por junuloj kaj senlaboruloj | 152 FRF |

Pagu al P.Quillaud CCP Rouen 1906 23 C

*******************************************************************

ESPERANTO FRANCE (UFE)

| | |
|---|---|
| Franca Esperantisto +Esperanto Actualités | 300 FRF |
| Nur Esperanto Actualités | 100 FRF |

Pagu al Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris

*******************************************************************

SAT AMIKARO

| | |
|---|---|
| kun Bulteno | 180 FRF |
| por junuloj | 90 FRF |

Pagu al SAT-Amikaro 67 Avenue Gambetta 75020 Paris
CCP SAT-Amikaro 37 852 90 L La Source

*******************************************************************

FEDERATION ESPERANTISTE DU TRAVAIL

| | |
|---|---|
| kun Le Travailleur Espérantiste | 150 FRF |

Pagu al FET 115 rue Béranger 92320 Chatillon
CCP 902 52 F Paris

TEJO (Junuloj) kun revuoj "Kontakto" +"Tejo Tutmonde" 120 FRF
Pagu al Esperanto-France
**********************************************************************

JEFO kun revuoj "Jefo informas" +"Koncize" 170 FRF
por studentoj kaj senlaboruloj 100 FRF
JEFO + UFE 300 FRF
Pagu al Esperanto France
**********************************************************************

FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO (kun bulteno) 40 FRF
Pagu al Association Française Catholique pour l'Esperanto
CCP Rouen 2324 93 N aŭ sendu ĉekon al Sro Villeneuve
14 rue du Clair de lune 91530 Saint Chéron
**********************************************************************

ALIAJ ASOCIOJ : Bonvolu informi nin ĉar ni ne konas la kondiĉojn
@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

## ABONU REVUOJN

*****************

Liste des revues auxquelles vous pouvez vous abonner par l'intermédiaire de Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris: en Francs français :
Dia Regno :65-, El Popola Ĉinio 192 -, Esperanto 200 -, Esperanto-Actualités 200 pour 5 ans -, Eventoj 230 ,- Franca Esperantisto 200 ,- Heroldo 180 ,- Kontakto 120 ,- Kulturaj Kajeroj 80 ,- La Domo 120 ,- La Kancerkliniko 125,- La Ondo de Esperanto (el Ruslando) 130,- Literatura Foiro 170,- Litova Stelo 68,- Monato 240,- Rok'Gazet' 100
Toutes les revues ne sont pas citées dans cette liste; veuillez contacter U.F.E.

Autres revues:
Le Travailleur Espérantiste 100 . Pagu al Fédération Espérantiste du Travail
SAT Amikaro 160 (por ne membroj de la asocio) Adresse: voir page 7 de ce bulletin
Sennaciulo 336,- Sennacieca Revuo 50 Payez à P.Quillaud CCP Rouen 1906 23 C
La Migranto (Naturamikoj) 55 Payez à Aurore Casnova 25 rue de Bourgogne 94440 Villecresnes

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

## KONGRESOJ

Nacia Kongreso de Fervojistoj en Plestin les Grèves Cotes d'Armor de la 30a de Aprilo ĝis la 5a de Majo
Internacia Kongreso de la Fervojistoj en Aalborg (Danio) de la 16a ĝis la 22a de Majo
Ekumena Kongreso (KELI-IKUE) en Rezé Loire Atlantique de 25/07 ĝis 01/08
Sennacieca Asocio Tutmonda kongresos de la 18a ĝis la 25a de Julio en Odessa (Ukrainio); Petu kongresaliĝilon ĉe SAT
SAT-Amikaro kongresos dum Pasko de la 11a ĝis la 13a de Aprilo en urbeto Quintin apud Saint Brieuc. La tuttaga ekskurso kondukos la partoprenantojn al urbo Dinan, kabo Fréhel, kaj fuorto La Latte. Aliĝiloj kaj informoj pri la kongreso estas haveblaj sub la jena adreso: Denis-Serge kaj Manjo Clopeau 6 rue J.P. Calloc'h 22000 Saint Brieuc

Kaj nepre partoprenu la **83an UNIVERSALAN KONGRESON** kiu okazos en Montpellier de la 1a ĝis la 8a de Aŭgusto. Kontaktu Esperanto France (UFE)

ESPERANTO - MOVADO en Francio estos centjara. Okaze de tiu evento, U.F.E. decidis, helpe de la juna sekcio JEUNESPERANTO, organizi feston dum la UK en Montpeliero; ĝi invitas vin ĉiujn. Ĝi decidis ankaŭ malaltigi simplan kotizon el 160 F al 100 F esperante tiel plialtigi la nombron de sia anaro

MONTPELLIER
01 - 08 aŭgusto 1998
83-a Universala Kongreso